## EKOLOGIA SEKCIO DE ISAE

El multaj kampoj, sur kiuj ISAE devus efike funkcii, sendube la plej urĝa estas tiu de **ekologio**.

SCIENCA MONDO, la oficiala organo de MSFL (Monda Federacio de Sciencistaj Laboristoj), kies esperantlingva versio aperadas en Bulgario, jam alportis serion da gravaj traktaĵoj pri ekologia katastrofo, minacanta la biosferon de nia planedo.

Do ne mirinde, ke same el Bulgario venis nova iniciato: prof. *Ĥristo Marinov* proponis fondi **Ekologian Sekcion de ISAE** (ES-ISAE). Surbaze de lia propono kaj de la nuna ISAE-statuto, la sekcio fondiĝis, komencante funkcii ekde 1.10.1978.

La prezidanto de ES-ISAE fariĝis mem prof. *Dr. Ĥristo Marinov*, Ekonomia Universitato, 5250 *SVIŜTOV*, Bulgario.

La sekretario de ES-ISAE fariĝis *Lev Vladimiroviĉ Medvedev*, kandidato de la geografiaj sciencoj, *pr. Mira*, 196-44, 129128 *MOSKVA*, Sovetio.

La sekcio projektas organizi **Danubaŭ Konferencon pri Ekologio**. Unu el ĝiaj oficialaj lingvoj estos Esperanto.

Interesatoj pri la ES-membriĝo turnu sin al la sekretario, tiuj pri la konferenco skribu al la prezidanto.

**ĈIUJN KUNLABORAĴOJN SENDU AL LA REDAKTORO:**

*RNDr. Josef Kavka*
*Lužná 7*
*160 00 PRAHA 6 – Vokovice*
Ĉeĥoslovakio

**Adreso-ŝanĝojn kaj informojn pri neregula ricevo de SCIENCA REVUO sendu rekte al la administranto:**

*Gersi Alfredo Bays*
*Caixa Postal 49*
*BR 89800 CHAPECÓ – SC*
Brazilo